

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo/Majo 1978



## Ekskursoj dum la IFEF-kongreso



**Tivoli**

Foto: Dehen

En BULTENO n-ro 1/1978 troviĝis la rekomendo eluzi la abundan oferton de la LKK por konatiĝi kun la „eterna metro-polo“ kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Jen kelkaj detaloj. La rondveturado donos proksimuman superrigardon pri la antikva Romo, konservita grandparte nur en ruinoj pro malpacaj invadoj kaj rigora forigo de paganaj temploj. Kion menci i aparte? La gigantan amfiteatron, la vastan Palatinon sur unu el la sep montetoj, la Romian Foirejon, la Triumfajn Arkojn de la imperiestroj aŭ la varmbanejojn — tro multe el pasintaj gloraj epokoj. Kompren-eble oni vidos ankaŭ multnombrajn konstruaĵojn el la mezepoko, ekz. la faman Anĝelan Kastelon apude de la rivero Tiberio, la grandajn preĝejojn, ŝpruco-fontojn kaj la Hispanan Stuparon, jam ofte montritajn en filmoj, kaj nelaste la gigantan bazilikon de la Sankta Petro situantan sur la tereno de la Vatikana Ŝtato. Specialan atenton meritas la vizito al la Vatikana Muzeoj kun iliaj unikaj kolektaĵoj el antaŭkristaj kaj postaj periodoj. De tie oni atingas ankaŭ la Vatikanan Kapelon, kiun la fama pentristo Miĉelanĝelo ornamis.

La elekto inter la tri tuttagaj ekskursoj sendube estas malfacila. Kiuj interesiĝas pri la Etruskoj, aparta tribo, trovos rimarkindajn spurojn el la tiamaĵ periodoj (6a ĝis 1a jarcentoj a. K.). La etruska arto, simila al la egipta arto, estas multe devigata al la kulto pri mortintoj. Tre komplika montras sin la etruska lingvo; ĝi estas tute diversa de ĉiuj antikvaj lingvoj.

Al la pitoreskaj urboj Viterbo, Bagnaia kaj Romarzo kondukos alia aŭtobus-ekskurso. Tie prezentiĝos precipe konstruaĵoj el la mezepoko kaj vigla vivo, tipe itala, en stratetoj kaj foiroj. Tivoli, la tria celo, ekzistis jam antaŭ la fondiĝo de Romo. Precipe belega estas la mirinda placo d'Este, kiu situas en romantika parko. Ĉie allogas la vizitantojn fontanoj, grotoj, temploj kaj terasoj. Fraskati apartenas al la lokoj en la Albanaj Montoj, kie oni produktas faman vinon, kaj en la Kastelo Gandolfo rezidas somere la papo. Do elektu laŭ via gusto, se vi ne jam faris. Kaj kiu ne aliĝis al la IFEF-kongreso, sendube bedaŭros sian foreston.

## Bremen invitas

**22a Jarkunveno de GEFA, 6. — 8. 10. 1978**  
**Unuaj informoj**


**Bremen** estas vizitinda, en jarcentoj kreskinta urbo — tamen juna, vigla kaj plena da pulsanta vivo. En Bremen oni konservas la tradicion, kaj kontraste, Bremen estas fokuso de moderna mond-komercado.

Venu, spertu mem!

La Bremena Esperanto-Grupo prezentas al vi informan kaj distran programon, por ke via restado en Bremen estu agrabla kaj ĝojiga.

Nia kunvenejo estas la historia gastejo „**Zum Kuhhirten**“, situanta sur insulo en la rivero Weser, 20 minutojn piede de la centro. Jam de jarcentoj ekzistas tiu ĉarma ĝarden-gastejo. Ĝi apartenas al la sindikato IG-Metall kaj estas nun kultura centro „por tri generacioj“.

Vendredon, la 6an de Oktobro, vespere, ni promenadu iom tra la centro de Bremen. Ni rigardu la „**Bremenajn Urbmuzikantojn**“ apud la urbdomo, por ke vi konstatu, ke vi fakte estas en Bremen.



**La Bremenaj Urbmuzikantoj**

Foto: Stickelmann

W. B.



Tra ĉarmaj stratetoj ni migru al „**Alt-Bremer Brauhaus**“. En tiu gastejo ni sidos en bierfareja ĉambro apud granda kupra kaldrono. Jen okazos nia gaja, senprograma vespero. Ni dancu iom kaj gustumu la bremenan bieron.

Samtempe okazos profunde preparita informvespero en belega salono de la patricia domo „**Stadtwaage**“. Estas digna kadro por tiu grava entrepreno.

Sabaton, la 7an de Oktobro, matene, ni aranĝos urb-rondiradon. Membroj de la Bremena Esperanto-Grupo gvidos kaj klarigos en Esperanto kaj en la germana. Ni renkontiĝos sur la foirejo, la mezpunkto de la urbo. Laŭ s-ro Baedeker ĝi estas „unu el la plej belaj en Germanio“. La **Rolandstatuo** staras jam de 1404 antaŭ la urbdomo sur la foirejo. Ĝi simboligas la Bremenan Liberecon; — pri tio la bremenanoj estas tre fieraj. Bremen estas unu el la plej malnovaj respublikoj en la tuta mondo.

En la sama tempo kiel la Rolandstatuo

la urbdomo estis konstruita. Tiam Bremen havis 10 000 enloĝantojn — hodiaŭ ĉ. 600 000.

La gotika urbdomo ricevis 200 jarojn poste renesancan fasadon. **Lüder von Bentheim** sukcesis tre lerte kombini la gotikajn kaj renesancajn elementojn.

La rekta vojo de la foirejo al la Weser kondukas tra la „sekreta ĉefstrato“, tra la „**Böttcherstrateto**“. Vi certe estos surprizitaj pri la stranga, bela strateto. La skulptisto **Hoetker** transformis tiun iaman metiistan strateton al unika artaĵo.

Promenante laŭlonge de la Weser, ni atingos la **Schnoor-Kvartalon**. Aminda, bohemia kvartalo kun domoj el la 16a — 17a jarcentoj, zorge flegitaj. Metiistoj, kiel teksistoj, orajistoj, pentristoj kaj aliaj vivas tie, tiel ke tiu ĉarma kvartalo absolute ne estas muzea.

La tagmanĝo en „Zum Kuhhirten“ estos por vi surprizo: Se vi estas sufiĉe kuraĝa, vi povas gustumi tipan maristan manĝaĵon: „**Labskaus**“.



**Bremen: Urbdomo kaj foirejo**

Foto: Saebens

Tio estas manĝaĵo farita el salita viando (Pökelfleisch), terpomoj kaj fiŝoj — kaĉigita. Aldone vi ricevos rostitajn ovojn kaj kukumojn. Kompreneble vi povas manĝi ankaŭ ion „normalan“ — sed, kaptu tiun unikan eblecon!

Ekskurso al **Worpswede** estas neforgesebla travivaĵo. En tiu artista vilaĝo en la vasta **Teufelsmoor** (Diabla Marĉejo) vivis kaj verkis famaj artistoj: **Moderohn, Hans vom Ende, Mackensen, Vogeler, Hoetger, Rainer Maria Rilke** — neblas menciigi ĉiujn.

Ili restis en Worpswede, ĉar la regiono estas neimageble inspiriga kaj bela — do: ankaŭ por nia ekskurso taŭga!

Vi povas elekti inter vizito de rimarkinda artaĵekspozicio aŭ promenado tra la belega regiono. Precipe vi povos admiri la belegan panoramon starante sur la monumento **Niedersachsenstein** (kunprenu lornon).

Poste atendos vin kafo kaj torto (inkluditaj en la ege malalta ekskurs-kotizo).

Valoras diri ion pri la **Festvespero**: Enkonduke ludos la ensemblo **Georg Espitalier** popolmuzikon per muzikiloj el la tuta Eŭropo. Post la oficiala bonvenigado dancigos nin **Willi Korek**. Tiu nomo jam signifas: ŝlosilo al sukcesa, plezuriga festvespero.

Ambaŭ, s-roj Espitalier kaj Korek estas konataj artistoj laŭ la elsendoj de Radio Bremen.

Dimanĉon, la 8an de Oktobro, okazos niaj matineaj prezentaĵoj en „Zum Kuhhirten“: Filmo kaj interesa prelego. Fine ni invitos niajn amikojn el Heilbronn prezenti ion pri la Jarkunveno 1979.

La aliĝiloj jam estas pretaj kaj disdonataj kune kun tiu „Bulteno“. Anoncu vin jam nun, por ke ni zorgu pri bonaj hotelaj ĉambroj por vi. En Bremen ĉiam estas multaj konferencoj, tiel ke ni devas mendi sufiĉe frue.

Atentu: **La unuaj aliĝantoj ricevos ĉarmajn donacojn!**

LKK-adreso: H. D. Hartig, Kasseler Str. 76, D-2800 Bremen 1, Germanio  
Deĵore: H.Lokf. Hartig, Bw Bremen Hbf (59)

Hg

## El la grupoj

### Hannover/Bremen

Die Jahreshauptversammlung wurde am 15. 2. durchgeführt. Dieter Hartig wurde als Vorsitzender wiedergewählt.

Zum Gruppenabend am 12. 4. konnte Frau Elisabeth Bormann, Präsidentin des Deutschen Esperanto-Bundes, als Gast begrüßt werden. Die Veranstaltungen finden ab sofort nur noch in der Kantine des Bw Bremen Hbf, Findoffstr. 13, statt.

Am 2. 9. wird ein Freundschaftsspiel der Amsterdamer Eisenbahnermannschaft gegen die Bremer Lokführer ausgetragen. Die Kontakte sind mit Hilfe der Internationalen Sprache angebahnt worden.

### Sanĝo de la distriktkomisiito en Essen

Fine de 1977 la ĝisnuna distriktkomisiito Günter Bartz pro deĵaraj kaj sanecaj kaŭzoj devis fordoni la oficon. Ni ĉi-loke dankas lin sincere pro la kelkjaraj gvidado en la distrikto Essen kaj esperas, ke li tamen ankaŭ estonte trovos tempon kaj okazon por partopreni la asocian vivon. Posteulo ek de la unua de Januaro 1978 estas kolego Manfred Retzlaff. Ni kore bonvenigas lin inter la distriktkomisiitoj kaj dankas pro lia preteco transpreni la taskon. Ni deziras al li, ke la nova ofico estu por li agrabla kaj donu al li okazon, kunhelpi en la refortigo de la membraro en sia distrikto kaj tiel ankaŭ de GEFA.

### Ni legis por vi en Heroldo 4/1978:

**Fervojaj horaroj.** La Fervojaj horar-libroj de Bulgario, Danlando, Jugoslavio kaj Pollando aperigas ĝeneralajn informojn en Esperanto kaj en pluraj aliaj lingvoj.

**La plej kongresemaj.** Inter la asocioj, kiuj aliĝis al la Internacia Federacio de la Artaj kaj Intelektaj Fervojistaj Societoj (FISAIC) nur tiu de la Esperantistaj Fervojistoj kongresas regule ĉiujare.

Das Wichtigste dieser Ausgabe in deutscher Sprache:

Seiten 2 — 4 Ausflüge während des IFEF-Kongresses in Rom und Bremen — Einladung zur Jahresversammlung 1978 —.

**Redaktfino por n-ro 3/1978 estas la 10. 6. 1978**



## Skisemajno en Grainau



Fotoj: Ritterspach

El sep landoj venis la 11an de Februaro 1978 preskaŭ cent geamikoj de vintra sporto al la monto Zugspitze por komune dum unu semajno skiveturi, promenadi kaj vespere distriĝi, ĉiam praktikante aŭ lernante la Internacian Lingvon. La organizinto, Josef Weidacher (meze),

trankvile majstris ĉiujn problemojn kaj zorgis por bavara bonhumoro (maldekstre kun Egon Kiefer). Ĉiam helpema estis Fred Gissibl (dekstre), laŭ kies arkordeona muziko oni dancadis ĝis malfrua nokto. Legu la detalan raporton en la „Internacia Fervojoisto“.

### Frankfurt/Main

Egon Kiefer, distriktkomisiito de BD Frankfurt/Main, invitis „siajn“ membrojn al jarkunveno, okazinta en la apudĉambro de la ĉefstacia BSW-kantino en Kassel. Bedaŭrinde kelkaj aktivaj membroj ne povis sekvi tiun inviton, sabaton, la 11an de Marto 1978.

Tamen, rondon da 17 alvenintoj s-ro Kiefer salutis kaj speciale bonvenigis 3 gastojn, nome s-ron Schroeder, BSW Kassel; s-ron Gießler, BSW-AW Kassel; kaj s-ron Müller, GDBA. Ĉiuj tri afable kaj kun multe da kompreno por nia afero direktis korajn salutvortojn al ni kaj post lerta, malgranda referato flanke de kolego Kiefer eĉ vigle diskutis (pozitive!) kun ni ĉiuj tiel longe, ke s-ro Kiefer apenaŭ havis tempon por antaŭ tagmanĝo paroli pri la dumjara laboro. Tamen li denove ne ellasis okazon, infektadi la gastojn per „Esperanto-baciloj“ kaj kiam ili adiaŭis, ili promesis

laŭpove subteni Esperanton en siaj organizaĵoj.

Post la tagmanĝo ni vidis du lumbild-seriojn: unu pri la Eŭropa Feri-Semajno en Wengen/Svislando kaj alian pri la Internacia Fervojoista Esperanto-Skisemajno en Grainau/Germanio. Tro rapide pasis la tempo en agrabla rondo, rapide ni kaŭtrinkis, manĝis kukon – gastame donacitan de la grupo Kassel – kaj ekpromenis por iom konatiĝi kun la urbo. Lertaj ĉiĉeronoj estis la s-roj Bode kaj Söhngen, kiuj senlace atentigis pri interesaĵoj kaj sciigis la interesitajn gastojn pri la historio de la iama kaj de la hodiaŭa Kassel. Estis ankaŭ s-ro Bode, kiu post la komencaj salutvortoj informis la alvenintojn pri zorge kompilita listo da iamaj Kassel-anoj, inter ili troviĝis la „eltrovinto“ de la logaritma sistemo. — Koran dankon al ĉiuj aktivuloj en Kassel.

Elisabeth Ritterspach

### 30. IFEF-Kongreß in Rom

Ihre Einzahlungen sind inzwischen von der Compagnia Italiana Turismo bestätigt worden. Ebenfalls wurden die Kongreßnummern mitgeteilt. Sollte die Bestätigung trotz rechtzeitiger Zahlung noch nicht eingegangen sein, so wenden Sie sich bitte an die obige Anschrift – siehe auch Hinweis im Anmeldevordruck. – Wenn dieses Bulteno in Ihren Händen ist, ist die Anmeldezeit verstrichen. Es wird empfohlen, Platzkarten rechtzeitig zu bestellen. Im Bulteno 1/78 wurde wegen des starken Pfingstverkehrs bereits darauf hingewiesen.

### Deziro de hispana kolego

Mi deziras kompletigi mian kolekton de BULTENO de GEFA, kaj pro tio mi petas la posedantojn de malnovaj numeroj, kiuj deziras vendi aŭ interŝanĝi ilin, bv, skribi al s-ro Ramon MOLERA Sta. Joaquina, 13 – Moyá (Barcelona) – Hispanujo.

### Fervojistaj terminaristoj diskutadis en Arnhem

Starigi fakterminaron en internacia kunlaboro per nura korespondado estas treege malfacila tasko. Tion spertadis la fervojistaj terminaristoj kaj ili ankaŭ konscias, ke unu aŭ du dumkongresaj kunsidoj ne povas sufiĉe rapidigi la progreson de la laboro. Tial oni interkonsentis, ke okazu almenaŭ unu interkongresa renkontiĝo.

Ĉi-foje Bennekom en Nederlando, proksime de Arnhem, estis la elektita loko, kien invitis Cor Broekman kaj Wim van Leeuwen por la semajnfino 19/20. Novembro 1977. Venis terminaristoj el Belgio, Francio, Germanio, Finnlando kaj Nederlando, entute dekunu viroj kun naŭ edzinoj. Dum la viroj ŝvite diskutadis, la virinoj zorgis por kafo kaj kuko inter la komunaj manĝoj en la Naturamika Domo, aŭ ili babilis, ĉar ekstere senĉese pluvadis. Sub tiaj idealaj laborkondiĉoj oni sukcesis eldiskuti pli ol 40 dubajn terminojn . . . La venonta kunveno de la terminaristoj: 15/16a de Aprilo en Bruselo.

Ritt.

### Esperanto in der Praxis

Im bequemen Taschenbuchformat mit 51 Seiten bietet die Österreichische Esperanto-Bewegung ihr Erzeugnis zum Preis von 30 öS + Porto an. Bei einer Bestellung an den Herausgeber in A-1014 Wien, Postfach 156, erhalten Sie 30% Nachlass ab 3 Exemplaren. Das Heft besteht aus 3 Teilen: Fragen, kompletter Grammatik und einem Wörterverzeichnis.

### Nekrologo

Post longa sufero mortis la 12an de Decembro 1977 nia longjara membro kaj amiko

### Franz Xaver Erhard.

Li estis ĉiam fidela kaj diligenta helpanto en la munkena grupo kaj ankaŭ ne mankis depost jardekoj en jarkunvenoj kaj kongresoj. Ni ne forgesos nian bonkoran kaj simpatian amikon.

GEFA-estraro

### Malnovaj revuoj kaj fotoj serĉataj.

#### Kiu povas helpi?

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), aliĝinta faka asocio de UEA, en kelkaj jaroj festos sian 75jaran fondiĝadon. Por ke ne forgesiĝu la gravaj eventoj kaj datoj kaj de la federacio kaj de la landaj asocioj, estas intencite verki „Historion“. Ni petas ĉiujn legantojn, kiuj povas helpi nin en la starigo de tia Historio, sendi siajn kontribuaĵojn al jena adreso:

Joachim Gießner, Bahnhof,  
D-3420 Herzberg am Harz  
Ni imagas ek de 1909 aŭ eĉ pli frue specimenojn de revuoj, fotojn, artikolojn, glumarkojn, insignojn ktp. Se iu ne deziras fordoni proprajn memoraĵojn, ni kompreneble akceptas fotokopiojn aŭ mem pretos kopii kaj redonos la originalon. Eventualojn kostojn ni repagos.

### Kulturaj aranĝoj 1978

en Esperantista Kulturdomo  
„Kastelo Grésillon“ F-49150 Baugé  
Unua somera periodo (3-22 de Julio)  
– Diverstemaj prelegoj – Diskutoj  
– Distraj aktivaĵoj  
– Ekskursoj  
– Praktikado de la lingvo (kursoj)  
Lundon 3an de Julio: interkona vespero  
Dua periodo  
(23an de Julio ĝis 12an de Aŭgusto)  
– Kurso por komencantoj  
– Praktikado  
– Supera kurso  
– Manaktivaĵoj  
– Ekskursoj

Dimanĉon 23an de Julio: interkona vespero  
Tria periodo  
(13an de Aŭgusto ĝis 2an de Septembro)  
Programo: vidu „dua periodo“